# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo februaro 2023**


## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

Laŭ la kunvoko sendita rekte al la anoj, la 30an de januaro okazis oficiala ĝenerala kunveno de Madrida Esperanto-Liceo, kun partopreno miksa, ĉeesta kaj reta.



Laŭ la tagordo, oni aprobis la raportojn, kontojn, agadprogramojn kaj buĝeton. La kotizo restas la sama, 12 eŭroj jare. Vi povas pagi ĝin al la konto en la banko ARQUIA BANCA, kun numero: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

Ni ankoraŭfoje memorigas ke vi povas aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo plenigante la aliĝilon kiu troviĝas en la fako "Dokumentoj" de la retejo de MEL: http://esperanto.es/mel/, aŭ simple kontaktante kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es.

## REKOMENCIĜAS LA AGADOJ EN LA SIDEJO

Dum la kunveno oni decidis rekomenci la kutimajn renkontojn kaj agadojn en la sidejo, kiuj dum la lastaj monatoj ne havis apartan programon.

La intenco estas denove kunveni ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo.

La duan lundon de ĉiu monato ni intencas organizi prelegojn, debatojn aŭ komunajn legadojn kaj diskutadojn. En februaro (tiu estos la 13a) momente la temo de diskutado estas ankoraŭ malferma, do vi mem rajtas proponi temon.

La kvaran lundon de ĉiu monato oni organizos legatajn teatraĵojn, kun partopreno libera de ĉiu ĉeestanto, por koni esperantan literaturon kaj praktiki paroladon kaj deklamadon.

La ceterajn lundojn la programo estos malferma kaj konsistos baze el senĝena babilado.

Venu, memoru ke la aliro estas malferma por ĉiu esperantisto, ĉu sperta aŭ komencanto.

## KULTURA AGADO

Ni rekomencas ankaŭ la kulturajn agadojn de la asocio post la komenco de la jaro.

La 23an de februaro ni vizitos la Muzeon pri Astronomio kaj Geodezio de la Universitato Complutense (vidu priskribon ĉe: https://www.ucm.es/cultura/museo-de-astronomia-y-geodesia), kiu troviĝas en la Fakultato pri Matematiko de la Universitata urbo, proksima al la metrostacio *Ciudad Universitaria*. La vizito ekos je la 12,00, kaj la renkontiĝejo estos la enirhalo de la fakultato apud la statuo omaĝe al Euler.

Se vi interesiĝas, bv. skribi al madrid@esperanto.es aŭ niavocho@gmail.com, ĉar estas limo de ĉeestantoj kaj ni devas koni la nombron da interesitoj.

## NOVAJ KURSOJ

Kiel ni anoncis, oni organizas kurson por progresantoj, sed la komenco prokrastiĝis al tiu ĉi monato februaro.

Ankaŭ gvidota de Andy oni nun planas kurson por komencantoj en la kvartalo Vallecas.

Se vi interesiĝas aŭ konas homon kiu ŝatus aliĝi al ajna el la kursoj, bv kontakti kun la Liceo ĉe: madrid@esperanto.es aŭ rekte kun Andy.

## NOVA ELDONO DE LA SCIENCA KALENDARO




En la jaro 2023 ni denove havas esperantan version de la Scienca Kalendaro de la CSIC. Memoru ke temas pri kalendaro kiu ĉiun tagon de la jaro memorigas eventon aŭ scienciston, kun aparta atento al diverseco.

Vi povas ĝin trovi kaj elŝuti laŭ pluraj formatoj el la adreso https://digital.csic.es/handle/10261/285166, kaj tie vi trovas ankaŭ version por facila legado kaj didaktikan gvidilon, kaze ke vi povas ĝin utiligi en mezlernejoj.

La kalendaro havas ankaŭ tŭiteran konton, kiu ĉiutage informas pri la koncerna datreveno, en la adreso: https://twitter.com/scikalendaro.

## PLI PRI LA KONKURSO DE DEBATO EN FUENLABRADO

Plu daŭras la preparoj por la konkurso pri debato en la municipoj de la suda zono de la madrida regiono, kiu, kiel ni informis en antaŭa numero, en la kazo de Fuenlabrado temos pri la rolo de Esperanto en la Eŭropa Unio. Nia juna samideano Jorge Brasal vizitis denove en januaro la lernejon "Salvador Dalí" en tiu urbo, por daŭrigi la informadon. Evidentiĝis tamen ke la studantoj jam bone konas la aferon kaj praktikis la debaton. Ankaŭ aliaj lernantoj kontaktis kun esperantistoj por koni pliajn detalojn pri la temo.

La komenco de la debato prokrastiĝis al la 3a de februaro, do ni atingos konkludojn nur venontmonate.

## ALIAJ MADRIDAJ KUNVENOJ



Ni daŭrigas la unuasabatajn rendevuojn en la strato Esperanto de Madrido. En januaro venis novaj parolantoj, kelkaj el kiuj renkontiĝis unuafoje kun esperantistoj. Vidu apude foton de la babilado.

Por februaro, ni denove kunvenos la unuan sabaton, la 4an, ankaŭ je la 18,30 horo en la sama loko, la polpejo Pulpería O Miño, ĉe la numero 2 (metrostacio Alsacia, lineo 2).

Memoru ke ĉiuj estas bonvenaj, sendepende de la nivelo de la lingvokono, kaj ke la babilado estas tute libera.

## PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com